# TEJO-aktuale: numero 164, 2005-04-13

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 164 (13 aprilo 2005)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>

---

1. VIAN ARTIKOLON PRI FAMILIOJ BONVENIGOS KONTAKTO
2. FESTEMULOJN BONVENIGOS SUDA FRANCIO FINAŬGUSTE
3. ONTA TEJO-ESTRARO: ALVOKO AL KANDIDATIĜO
4. LA CENTRA OFICEJO VIN MALFERME BONVENIGOS VENONTSEMAJNE
5. PARTOPRENU IJK-N: FINANCA HELPO POR LA VOJAĜO

---

1. VIAN ARTIKOLON PRI FAMILIOJ BONVENIGOS KONTAKTO

Temo de Kontakto 2005:2 estos familioj. La revuo Kontakto
estas grava ilo, per kiu ni lernas pri aliaj kulturoj,
kaj "familio" estas temo por tio taŭgega. Kiel funkcias
familio en via lando? Rilatoj inter familianoj, kutimoj
konektitaj kun familioj -- ĉio ĉi estos por la legontoj
interesa! Specialan atenton ni metos al denaskismo kaj
funkciado de Esperanto en familioj. Viaj kontribuoj
estas bonvenegaj kaj ege bezonataj! Tiujn prifamiliajn
ja sendu ĝis la fino de tiu ĉi semajno: retpoŝtadreso
kontakto (ĉe) tejo.org.

---

2. FESTEMULOJN BONVENIGOS SUDA FRANCIO FINAŬGUSTE

La ĉi-jara Francia renkontiĝo FESTO okazos 2005-08-20/27
(sab/sab) apud Mazamet, tuj apud la lago de Saint-Peyres,
ie inter Castres kaj Carcassone. Tie vi povos promeni kaj
malkovri belan regionon. La temo estas: Amo Ĉiam!! Vi povos
partopreni ludon por trovi amat(in)on, okazos konkurso pri
amkanto (parodioj bonvenos), kaj aliaj: la teman programon
eblas ekvidi en la blogo (=trototolo)
http://festo2005.blogspot.com/
La unua aliĝperiodo finiĝas jam (mer) 2005-04-20, do certe
rigardu la detalajn informojn ĉe
http://festo.esperanto-jeunes.org/
-- kie vi povas ankaŭ tuj aliĝi!

---

3. ONTA TEJO-ESTRARO: ALVOKO AL KANDIDATIĜO

Dum la venonta Komitatkunsido de TEJO (julie/aŭguste 2005)
elektatos nova Estraro de TEJO. Estas la tasko de la Elekta
Komisiono proponi al la Komitato kandidataron kiun ĝi taksas
taŭga por la taskoj; poste voĉdonos la Komitato: detale pri tio
http://www.tejo.org/aktivuloj/regularo/regularo.php?parto=elekto_de_estraranoj
Tial ni petas al ĉiuj kiuj interesiĝas pri laboro en la onta
Estraro de TEJO, kontakti la Elektan Komisionon, kunsendante
(trafajn kaj ne tro longajn) respondojn al la jenaj demandoj:

Viaj nomo kaj aĝo?
Viaj loĝloko kaj profesia aktiveco?
Al kiu posteno en la Estraro de TEJO vi strebas?
Kiujn aliajn taskarojn vi kapablus kaj pretus prilabori?
Kio estas via ĝisnuna movada aktiveco?
Ekstermovada civilcivitana aktiveco?
Sekvitaj trejnseminarioj kaj kursoj de TEJO?
Por alparoli la Elektan Komisionon (Anna-Laura WICKSTRÖM, Gregor HINKER, Ilja DE COSTER), skribu al la jenaj retpoŝtadresoj: lowa (ĉe) gmx.de, gregor.hinker (ĉe) esperanto.at, ilja (ĉe) tejo.org
La limdato por kandidatiĝi estas (dim) 2005-04-24.

---

4. LA CENTRA OFICEJO VIN MALFERME BONVENIGOS VENONTSEMAJNE

La sekva Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO estos sabate 2005-04-23 ekde la 10-a ĝis la 17-a horo.
En la programo interalie estas prelegoj de Baldur Ragnarsson (unu pri islanda lingvo, alia pri diversaj sintenoj al Esperanta literaturo) kaj de Ziko Marcus SIKOSEK (pri lia nov-aperinta libro "Sed homoj kun homoj"). Senpagaj loterio kaj varmaj teo kaj kafo dum la tuta tago; specialaj rabatoj en la libroservo; bazaro de esperantaĵoj: ĉio ĉi apartenas al Malfermaj Tagoj en la Centra Oficejo. Kiel atingi, trovu en
http://co.uea.org/~tejo/kiel_atingi_mft.html
Post la Malferma Tago, je la horo 18:30, NEJ organizas Esperantan Drinkadon (eventuale Manĝadon) en la Hotelo Nov-Jorko, ankaŭ vidu ĉe
http://co.uea.org/~tejo/kiel_atingi_mft.html
Legu ankaŭ Gazetaran Komunikon de UEA pri la Malferma Tago
http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gaz196.html#1

---

5. PARTOPRENU IJK-N: FINANCA HELPO POR LA VOJAĜO

TEJO havas branĉojn aŭ aktivajn kunlaborantojn, kaj celas disvastigon de Esperanto, en la tuta mondo: ja ankaŭ en nepagipovaj landoj. Se aktivuloj el tiuj ĉi landoj povus partopreni IJK-n, tio estus granda impulso kaj evoluinstigo por progresigo de Esperanto en iliaj lando kaj regiono. TEJO disponas pri modestaj financaj rimedoj por helpi kunfinanci ilian vojaĝon: ni petas pagipovajn samideanojn pri helpo kaj kontribuo al la fonduso "Partoprenu IJK-n", por ke ni povu helpi ju pli efike! Al kiu iros tiu ĉi helpo?
Por trovi, al kiu ĝi estos plej utila, TEJO decidis starigi konkurson, kie oni decidos laŭ objektivaj kriterioj. Inter la kondiĉoj estas: esti neniam partopreninta alikontinentan IJK-n, loĝi ekster Eŭropo, havi subtenleteron de 3 membroj de TEJO (el minimume 2 diversaj landoj), esti mem individua membro de TEJO (al tiuj, por kiuj tio malfacilas, povas helpi la Fondaĵo Canuto de UEA), plenigi demandaron kaj detale priskribi sian lokan aŭ/kaj internacian Esperantan agadon. La limdato por kandidatiĝi estos fine de majo 2005. Precizaj kondiĉoj (nepre ilin legu!) estis ĵus publikigitaj en TEJO Tutmonde (2005:1), kiu atingas vin en tiuj ĉi tagoj, kaj baldaŭ ili legeblos ankaŭ en la Interreto: atentu kaj atendu la venontan numeron de TA, te. de tiu ĉi novaĵletero!

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS kaj Martin MINICH.
Tiun ĉi numeron redaktis Martin MINICH.